

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – DR. Josef HRADIL, Mnichovo Hradiště 718

Cena – dobrovolný příspěvek

Povolil ONV Mladá Boleslav, odbor kultury 47/87-403/16

SEPTEMBRO 1989

3

ZÁŘÍ 1989

FEJA (Fondaĵo de Esperantistaj junularaj aranĝoj) USSR, 109004 MOSKVA, abonkesto 78

anoncas

Baldaŭ en Sovetunio aperos Video-Muzika Centro.

1. Aperos la unua originala granda disko en Esperanto, kiu estas rezulto de komuna laboro de komponisto, poeto, reĝisoro Vladimir Soroka, lia plej populara en Sovetunio E-ensemblo, koncertanta okde 1981, kaj de esperantistoj el diversaj landoj (Hungario, Usono, Bulgario, Japanio, Hispanio, Ĉinio, Francio, GDR, Britio) kaj sovetiaj respublikoj (Ukrainio, Kazaĥio, Moldavio, Latvio, Armenio, Rusio). La disko konsistas el du partoj. La unua parto: „Kiulingve?“ en la stilo de popromantismo rakontas pri amo kaj amikeco de gejunuloj, iliaj vojaĝoj, distroj.

La dua parto estas filozofia-psikologia miniopero „Destin“ aŭ „Tragedio de la Homo.

FEJA (Fond Mládežnických Esperantských Uspořádání) SSSR, SU-109004 Moskva, pošt.schr. 78

oznamuje

Brzy v Sovětském svazu začne fungovat Video hudební centrum.

1. Vyjde první originální velká gramofonová deska v esperantu, která je výsledkem společné práce komponisty, básníka, režiséra Vladimíra Soroky, jeho nejoblíbenějšího souboru v Sovětském svazu, koncertujícím od roku 1981 a esperantistů z různých zemí (Maďarsko, USA, Bulharsko, Japonsko, Španělsko, Čína, Francie, NDR, Velká Británie) a sovětských republik (Ukrajina, Kazachsko, Moldávie, Litva, Arménie, RSFSR). Deska je sestavena ze dvou částí. První část „Jakým jazykem?“ ve stylu popromantismu vypráví o lásce a přátelství mládeže, jejich cestování, zábavách.

Druhá část je filozoficko-psychologickou minioperou „Destin“ aneb „Tragédie člověka“.

2. La ununa muzika video-filmo pri la 2-a Internacia Junulara Esperanto renkontiĝo en Minsk (USSR, 1989), prezentanta diversajn stilojn de sovetia originala muziko (reĝisoro V. Soroka).

EL LA KLUBO ŽELENY BROAD

Budapeŝta Informilo instigas nin:

Esperanton – kie, kiucele?:

BI intenceas daŭre publikigi ekde sia januara numero la nomojn de firmaoj, kie laboras esperantistoj kaj kie Esperanto estas uzata. Temas pri la faka utiligo de nia lingvo. Multaj el la esperantistoj laboras en fabrikoj, uzinoj, entreprenoj, komercaj firmaoj, kooperativoj, hoteloj, ktp., kiuj ofertas siajn varojn kaj servojn. Kiu kion ofertas?

Tiujn informojn ni ne konsideras reklamojn, kvankam estas en ili iom da reklameska. Do, vi estas petataj – se vi pretas disvastigi la uzadon de Esperanto en via propra faka tereno – sendi al redakcio de BI la nomon kaj adreson de la homoj, kiuj scipovas Esperanton ĉe vi.

Adreso: Budapeŝta Informilo, pf. 193, H-1368 BUDAPEST, Hungario

Ĉu disvastigi aŭ apliki?

Bedaŭrinde la ĉiutaga vivo de esperantistoj montras, ke ili uzas Esperanton pliparte nur en la libera tempo (kaj kiom malmultaj nuntempe havas liberan tempon!). Por multaj nek la lingvo, nek la movado kontentigas gravajn bezonojn, tial post konatiĝo kun la lingvo aŭ post la varmiĝeto en la movado ili foriras. El ĉi tiuj supraj pensoj sekvas, ke nia taktika celo devas esti la ampleksigo de uzado – apliko de Esperanto anstataŭ la ĝisnuna preskaŭ senescepta nur libertempa uzado de la lingvo. Unufraze: nia celo estu, ke tiel eble la plej multaj esperantistoj uzu la lingvon labortempe. La uzado-aplikado de la internacia lingvo dum la unua jarcento jam pruvis preskaŭ ĉion, kion homa cerbo povas imagi. Ni ne devas eltrovi la ovon de Kolumbo, male, ni kolektu el la nuna ĉirilata praktiko la plej promesplenajn ekzemplojn, kaj ni proponu ilin por la aliaj.

(BI88/11)

2. První hudební video-film o 2. mezinárodním mládežnickém setkání v Minsku (SSSR, 1989), představující různé styly v sovětské originální hudbě (režisér V. Soroka).

Z ŽELENOBRODSKÉHO KLUBU

Budapeŝta Informilo nás vyzývá:

Esperanto – kde, za jakým účelem?:

BI má v úmyslu trvale od svého lednového čísla publikovat jména firem, kde pracují esperantisté a kde je esperanto využíváné. Jedná se o odborné využití našeho jazyka. Mnozí z esperantistů pracují v továrnách, závodech, podnicích, obchodních firmách, družstvech, hotelích atd., které nabízejí své služby a zboží. Kdo co nabízí?

Tyto informace nebudeme považovat za reklamu, i když v nich bude něco reklamního. Prosíme Vás tedy -jste-li připraveni rozšiřovat užívání esperanta ve Vašem vlastním odborném terénu – zašlete redakci BI jméno a adresu vašeho pracoviště, jména lidí, kteří u Vás esperanto ovládají na adresu:

Budapeŝta Informilo, pf. 193, H-1368 BUDAPEST, Maďarsko

Rozšiřovat nebo aplikovat?

Bohužel, každodenní život esperantistů ukazuje, že užívají esperanta jene ve volném čase (a jak málokterí mají v současnosti volný čas!). Mnohé ani jazyk, ani hnutí neuspokojí v důležitých potřebách, proto po seznámení se s jazykem nebo po ohřátí se v hnutí odcházejí. Z těchto výše uvedených myšlenek plyne, že naším taktickým cílem musí být zahrnutí využívání esperanta ve volném čase. Jednou větou: Naším cílem ať je, aby co nejméně esperantistů využívalo esperanta pracovní. Využívání-aplikace esperanta-mezinárodního jazyka během prvního století již vyzkoušela téměř všechno, co si lidský mozek může představit. Nemusíme tedy znovu vynalézat Kolumbovo vejce, naopak, seberme z nynější tohoto se týkající praxe nejslibnější příklady a navrhneme je jiným.

Turismo kaj informado

La aplikado de Esperanto sur turisma kampo estas samaĝa, kiel la movado mem. Tamen, malgraŭ fortostreĉoj la rezultoj estas efemeraj. Kial? Laŭ mi pro tio, ĉar ni ne koncentris niajn fortojn sur la plej rezultodonajn terenojn. El inter tiuj, kiujn mi taksas rezultodona, mi proponas unu kampon, sur kiu per malmultaj elspezoj ni povus akiri longdaŭran efikon. Tio estas la informiloj metitaj en la lokojn vizitataj de multaj. Ni vidas la diversajn formojn de informiloj en muzeoj, preĝejoj: afiŝojn, prunteblajn foliojn, magnetofonajn sonbendojn kaj similajn ... Kie estas la avantaĝo de ĝi tiuj rimedoj kompare la gvidlibrojn, prospektojn kaj ceterajn presitaĵojn? Jen: ili restas uzablaj dum longega tempo; ilin vidas ne nur esperantistoj, sed ankaŭ alilingvanoj, kiuj serĉas sialingvajn informojn (do, ili havas propagandan efikon por la vasta publiko; eventuale povas kompreneti ĝin eĉ tiuj, kiuj ne trovas informojn en la gepatra aŭ alia lingvo konata al ili.

Kiel mi imagas realigi tiun planon? Kelkaj ekzemploj: se ni ekscias, ke ie oni starigos novajn informotabulojn aŭ ajnajn konstantajn informilojn, ni tuj proponu uzi ankaŭ Esperanton. Sed en la praktiko ni tre bone scias, ke la diversaj instancoj tiun proponon nur malofte akceptas, vane ni prezentas niajn raciajn argumentojn ... Se la propono estas senrezulta, tiam ni ofertu la kostojn de la aplikado de E-lingvaj informiloj.

Por igi racie, mi proponas la komencon tie, kie la kontraŭstaro supozeble estas la plej malgranda. Verŝajne en ne tro frekventanta preĝejo aŭ muzeo oni permesas minimume la prunteblajn, bele tajpitajn informojn en plasta ujo aŭ la bele desegnitajn afiŝojn. Poste la tiel akiritaj spertoj helpos rezultodone agadi en la pli frekventataj lokoj. Tre gravas, ke vi ne atendu la agon de iu alia. Ĉiu grupo entreprenu fari la unuan paŝon en propra ĉirkaŭaĵo.

O. Princ

Turistika a informace

Aplikace esperanta v oblasti turistiky je stejně stará jako hnutí samotné. Přesto, přes všechno úsilí, jsou výsledky prchavé. Proč? Podle mne proto, že jsme své síly nesoustředili na oblasti dávající největší výsledky. Z těch, které počítám za plodné, navrhuji jednu oblast, ve které bychom s malými výdaji mohli získat dlouhodobý účinek. Vidíme různé formy tabulí v muzeích, kostelích, plakáty, listy k zapůjčení, magnetofonové pásky a podobné. Co je výhodou těchto prostředků ve srovnání s průvodci, prospekty a ostatními tiskovinami? Tato: zůstávají k používání po dlouhou dobu; vidí je nejen esperantisté, ale i uživatelé jiných jazyků, kteří hledají informace ve svém jazyku (tedy mají propagační účinek pro široké publikum) i eventuálně mohou je částečně pochopit i ti, kteří nenajdou informace ve svém nebo jiném, jim známém jazyku.

Jak si představuji realizaci tohoto plánu? Několik příkladů: dozvíme-li se, že někde budou umístěny nové informační tabule nebo jakékoli trvalé informace, hned navrhněme užít také esperanta. Avšak v praxi velmi dobře víme, že různé instance tuto nabídku pouze velmi zřídka přijmou, nadarmo předkládáme své rozumné argumenty ... Zůstane-li návrh bez výsledku, pak navrhněme zaplacení informačních tabulí v esperantu.

Abychom jednali rozumně, navrhuji začít tam, kde můžeme čekat nejmenší odpor. Nejspíš v nepříliš frekventovaném kostele nebo v muzeu povolí alespoň v plastu zabalené, hezky na stroji napsané informace sloužící k zapůjčení nebo hezky namalované plakáty. Potom takto nabyté zkušenosti pomohou efektivně jednat na navštěvovanějších místech. Je velmi důležité, abyste nečekali, že začne někdo jiný. Každá skupina ať podnikne první krok ve svém vlastním okolí.

Oszkár Princ

La redakcio de BI aldonas:

Evidente tre gravas, ke tiuj tekstoj estu skribitaj en bona Esperanto; tial nepre kontroligu ĉiam viajn tradukojn. Tiun taskon entreprenas la redakcio de nia gazeto senpage.

Karaj gesamideanoj,
nia Esperanto klubo en Železný Brod preparis tiujn ĉi kelkajn vortojn por Verda Familio. Ĉu vere BI instigos min? Ĉu trovigos iu (ev. klubo), kiu pretos korekti informilojn? Ankaŭ nin interesos viaj unuaj kaj pluaj ĉirilataj spertoj.

Skribu afable al Václav Pospíšil, Na vápence 771/7, 468 22 Železný Brod.

Rimarko de la redakcio: Nia klubo kiam ajn korektos viajn tekstojn kondiĉe de sendo de ĉeĥalingva originalo.

Redakce BI dodává:

Jistě je velmi důležité aby tyto texty byly napsány dobrým esperantem; proto si vždy nechte zkontrolovat Vaše překlady. Tento úkol podnikne redakce našeho časopisu bezplatně.

Milí samideáni,
naš esperantský klub v Železném Brodu připravil těchto pár řádek pro Verda Familio. Podníti nás skutečně BI? Najde se někde (event. klub), který bude ochoten opravit informace? Také se zajímáme o Vaše první a další takové zkušenosti.

Pište na Václav Pospíšil, Na vápence 771/7, 468 22 Železný Brod.

Poznámka redakce: Naš klub v Mnichově Hradišti kdykoli opraví vaše texty pod podmínkou zaslání originálu v českém jazyce.

Meritplena aktiveco de s-anino Eva Seemanová kaj la klubo en Železný Brod:

Nia senlaca kultura portantino aktoristino Eva Seemanová daŭrigas disvastigon de belarta literaturo. Ŝia senlaca laboro kaj diversloka aktiveco portas sian frukton. Ŝi kreis rondon de amikoj de la esperanta klubo kaj poezio, kiu regule vizitadas ŝiajn artvalorajn prezentaĵojn. Kiu scias, kio signifas elstudi kaj parkere prezenti tutvesperan novan programon, miregas pri ŝiaj prezentaĵoj ekzemple nur juniaj: „Vizaĵo de la aktorino“ (laŭ motivoj de la romano de Olga Scheipflugová „Karanteno“) kaj Renkontiĝo kun la poeto: „Templo kaj fortikaĵo de Pavel Eisner. Krom tio ŝi beligis la 17an de junio ekskurson al kastelo Hrubý Rohozec per ŝia prezentaĵo de poezio de nia regiona poeto Fráňa Šrámek, kiun partoprenis bedaŭrinde nur 12 esperantistoj, tamen multaj brigadistoj-Brontosauristoj, kiuj senlace helpas konservadon de la kastelo, kiu estiĝis vera perlo inter abundaj kulturaj monumentoj de nia regiono. Ĉiuj havis eblon aŭskulti eksterordinare interesan prelegon pri la kastelo de prof. Horáček el Turnov, aparte preparitan por esperantistoj.

Dankon kaj mankison al E.S. !

Záslužná aktivita naší paní Evy Seemanové a klubu v Železném Brodu:

Naše neúnavná nositelka kultury herečka Eva Seemanová pokračuje v rozšiřování umělecké literatury. Její neúnavná práce a aktivita na různých místech přináší své ovoce. Vytvořila kruh přátel poezie při esperantském klubu, který pravidelně navštěvuje její umělecká představení. Kdo ví, co znamená nastudovat a zpaměti přednést nový celovečerní program, žasne při jejích představeních, např. jen v červnových v Žel. Brodě: „Tvář herečky“ (na motivy románu Olgy Scheipflugové „Karanténa“) a Setkání s básníkem: „Chrám a tvrz“ Pavla Eisnera. Mimo to byla ještě ozdobou výletu na zámek Hrubý Rohozec 17.června svým představením poezie našeho kraje básníka Fráni Šrámka, kterého se bohužel zúčastnilo jen 12 esperantistů, avšak též mnoho brigádníků Brontosauru, kteří neúnavně pomáhají v údržbě objektu zámku, který se stal skutečně perlou mezi mnohými kulturními památkami našeho kraje. Všichni měli možnost vyslechnout mimořádně zajímavou přednášku prof Horáčka z Turnova o zámku, speciálně připravenou pro esperantisty.

Dík a rukypolíbení E.S. !

ARGUMENTOJ: rubriko por aperigi opiniojn de niaj legantoj:

Reagoj al Vlasta 9/89: La pedagogino post demando, kion ŝi scias pri Eo, diras, ke ŝi rekonas ĝin nur kiel hobion. Tiu okulvide edukita virino scias nenion pri la rezolucio de UNESCO el la j.1985 el Sofio, kiu rekomendis al ĉiuj membroŝtatoj enkonduki eon prove en lernejojn kaj klerigajn institutojn ... (Oldřich Antoš, Děčín).

Dum lernado de fremdaj lingvoj nenio substituas eksterlandan lernadon ... Nuntempo postulas komunikadon, kiun tre faciligos lernado de E-o. Estus bone, se ni povus interparoli kun virinojn, kiuj venas el eksterlando, aŭ delegite aŭ private. Disvatiĝas ankaŭ tre simpatia formo de la interŝanĝo de la tutaj familioj. Pro tio mi proponas al la virina movado akcepti Eon kiel pontolingvon por la internaciaj traktadoj. Kun mia familio mi ĝuis eksterlande specialan amikan atmosferon kaj dum kaj post la esperantaj konferencoj. Eblas paroli sen baroj kun iu ajn. Eĉ ordinara interparolo, kia estas ekzemple pri la familio, elvokas en ni varmigajn sentojn kaj firmigas en ni scion, ke ĉiuj homoj volas vivi en paco. Kaj ĝuste pro tio necesas, ke ĉiuj homoj povu interkompreniĝi ... (Marta Antošová, Děčín).

Nepre ĉiu aĉetu VLASTA N-ro 29/89, kiu enhavas gravajn faktojn, tiom bezonataj por varba laboro, en la dupaĝa granda intervjuo kun nia prezidanto ing. Petr Chrdle Csc. Mendu eĉ kelkajn ekzemplerojn ĉe la redakcejo Vlasta Jindřišská 5, 11608 Praha 1. Faktoj konvinkos la interesulojn kaj formato de la artikolo pruvos, ke E-o havas jam sian malfacile elbatalitan pozicion kaj ke valoriĝas iom da tempo necesa por ĝia studo.

Esperanta bildvortaro - dum 25 jaroj la intensa laboro prepatita, jam aperis. Ĝi enhavas 880 paĝojn kun 25000 nocioj. Temas pri 368 tabuloj kun priskriboj de iliaj objektoj (po 58-60 vortoj) kaj fina detala registro, kiu ebligas trovi kaj klarigi ĉiujn vortoj, precipe de teknika karaktero. La libro estas bedaŭrinde aĉetebla nur en okcidenta libromerkato.

ARGUMENTOJ: rubrika ke zveřejnění mínění našich čtenářů:

Pedagogická pracovnice na otázku, co ví o Esperantu, říká, že je uznává jen jako koníček. Tato vzdělaná žena zřejmě nic neví o rezoluci UNESCO z roku 1985 v Sofii, která doporučuje všem členským státům zavést zkušebně do škol a osvětových zařízení (Oldřich Antoš, Děčín).

Při učení cizím jazykům nic nenahradí pobyt v zahraničí ... Dnešek požaduje dorozumívání, jaké velmi usnadní učení Esperantu. Bylo by dobré, kdybychom si mohly promluvit se ženami, které přijíždějí z ciziny ať delegovány nebo soukromě. Rozšiřuje se také velmi sympatická forma výměny celých rodin. Proto navrhuji ženskému hnutí přijmout Eo jako společný jazyk pro mezinárodní jednání ... S mojí rodinou jsem v cizině zažila zvláštní přátelskou atmosféru během i po esp. konferencích. Lze hovořit s kýmkoliv bez překážek. I takový obyčejný rozhovor, jako je o rodině, vyvolá hřejivý pocit a upevní v nás vědomí, že všichni lidé chtějí žít v míru. A právě proto je nutné, aby se všichni lidé mohli dorozumět ... (Marta Antošová, Děčín)

Bezodkladně si kupte VLASTu č. 29/89, která obsahuje závažná fakta, tolik potřebná pro náborovou práci, ve dvoustránkovém rozhovoru s naším předsedou ing. Petrem Chrdlem Csc. Objednejte i několik výtisků v redakci Vlasty, Jindřišská 5, 11608 Praha 1. Fakta přesvědčí zájemce a formát článku dokáže, že Eo má svoji těžce vybojovanou pozici a že se vyplatí trochu času, věnovaného jeho studiu.

Esperantský obrazový slovník, připravovaný 25 let intenzivní práce, byl vydán. Obsahuje 8802 stran s 25000 pojmy. Jde o 368 tabulí s popisy jejich předmětů (po 58-60 slovy) a závěrečným detailním rejstříkem, který umožní lehce najít a vyložit všechna slova, zejména technického charakteru. Knihu lze bohužel koupit jen v západním knižním trhu.